



MALGRANDA

N:RO 4 **REVUO** 1944

2-a JARO

PREZO: 1,- Kr.

ENHAVO:

	Pago
Mistero kaj miraklo, de Stellan Engholm	1
La plej proksima vojo, de F. Szilágyi	3
Memoroj de estona rifuĝinto, de Rein Kapper	11
Franca vilaĝo, de Claude Planus	13
Konfucio, de Hélène Reymond	19
Kvar malnovaj kamaradoj, de P. TH. Justesen	21
El notlibro, de K. R. C. Sturmer	29
Doktrino de Kristo, de Agostinho de Silva	31

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

Mistero kaj miraklo

De STELLAN ENGHOLM

Por niaj prapatroj la vivo estis mistero kaj miraklo. Enigmaj estis naskiĝo, vivado, morto, la naturaj fenomenoj en la ĉiela spaco kaj sur la tero.

Sed ili volis kompreni, kaj ili elpensis klarigojn. Estiĝis kredo pri bonaj kaj malbonaj fortoj, estiĝis magio, diokredo. Al tiuj klarigoj aldoniĝis inklino de la homa spirito: deziro al pliboniĝo kaj perfektigi. Tiel estiĝis religiaj ordonoj kaj leĝoj, kiuj admonis la homojn, ke ili fariĝu kiel la plej perfekta, kion ili povas elpensi, kiel Dio.

Tiu kredo kaj subsentado de vivosenco donis al ili vastan kaj tutecan vidon pri la vivo, donis sencon al ilia propra vivo, donis vivocelon al ili kaj al la tuta homaro. El tiu vivrigardo estiĝis grandaj spiritoj, filozofoj, profetoj kaj aliaj pensuloj, kiuj klare vidis se ne la klarigon tamen la grandan misteron. El la animvibriga sento antaŭ la vivomistero kaj el la propra inklino al perfektigi naskiĝis ĉio, kio havas daŭran valoron en la historio kaj en unuopaj homvivoj.

La nuntempaj homoj preskaŭ perdis tiun senton pri la vivo. Ili forlasis la primitivan fortokredon, forlasis ankaŭ la spiritaĵn valorojn, kiuj dum jarmiloj estiĝis el primitiva kredo. Por ili la scienco ĉion klarigas, egale ĉu ĝi troviĝas en populara revuartikolo aŭ en peza scienca verko. Eĉ se ili neniom scias pri scienco, ili tamen scias, ke scienco anstataŭigis iaman kredon, kaj tio sufiĉas por ili. Naskiĝo, vivado, morto estasologiaj faktoj. Ĉio estas

fakto de iu aŭ alia speco. La universon regas naturleĝoj, kaj la homoj utiligas tiujn. Faktoj kaj tekniko, jen la enhavo de la nuntempa homvivo.

Ili forlasis primitivan kredon sed ne lernis klare vidi la mondon kaj racie pensi. Kie trovi tempon por rigardi kaj mediti? Ili estas ĉiam okupitaj, ĉiam pelataj de laboro al distro, de distro al laboro. Iliaj animoj fariĝas sentsentaj kaj senvivaj de la ĉiama bruado de la moderna vivo. Perdiĝis la sento por la mistero kaj la mirakleco de la vivo. Perdiĝis ankaŭ la sento por vivosenco kaj vivocelo. Dum tuta homvivo ili eĉ ne rimarkas la vivon, eĉ ne sian propran.

Ni lernis kelkajn aferojn pri la ekstera flanko de la vivo. En pli profunda rilato ni komprenas ne pli multe ol antaŭ jarmiloj niaj praaĵoj, malpli multe ol Sokrato, kiu sciis, ke li nenion scias. Sed se ni donos al ni tempon kaj trankvilon por observi la vivon kaj mediti pri ĝi, ni trovos, ke ĝi ankoraŭ estas same grandioze mistera kaj mirakleca kiel iam en la infanaĝo de la homaro. La tuta universo de atomoj ĝis stelsistemoj estas same grandioze mirakleca por ni kiel por niaj praaĵoj, eĉ pli, ĉar ni povas pli multe vidi kaj pli bone pensi, se ni nur volas.

Se ni lernos vidi kaj mediti, revenos al ni tiu animvibriga, feliĉiga sento de vivosenco kaj vivocelo. La vivado fariĝos por ni aventura kaj neklarigebla sed tamen sencoplena vojaĝo de pratempa nebulo al dia perfektigo. Ni eksentos, ke la vivado estas sankta afero, plena de respondeco, ke ni havas grandan taskon por prizorgi.

La plej proksima vojo De F. SZILÁGYI

(Skizo pri la evoluo de la helplingva ideo antaŭ Volapük kaj Esperanto)

La lingvo estas rimedo por interkompreno. Homoj faris ĝin, kaj homoj ŝanĝas ĝin. Ne estas instinkto, kiu diktas niajn vortojn, sed ni lernas ilin de nia infanaĝo. En la mezepoko kaj en la komenco de la nova epoko estis modo diskuti pri instinkta lingvo. Tio nuntempe revenadas nur kiel fantomo; oni povas trankvile konstati, ke la lingvo estas homa faraĵo. Antaŭ jarcentoj seriozaj sciencistoj proponis eksperimentojn por konstati, kia estas la instinkta lingvo. Ekzistas praantikva anekdoto pri la angla reĝo Johano la I-a. Pri la vereco de la historio ni ne kuraĝas juri, sed tio ne malutilas al la anekdoto. Reĝo Johano havis specialan intereson pri la "instinkta" lingvo, kaj tial li lasis izoli du etaĵn infanojn en la profundo de arbaro en alta turo kaj severe malpermesis al la gardistoj paroli al ili. La problemo estis, ĉu la infanoj iam parolos angle aŭ ne. Kelkajn jarojn poste la reĝo intencis viziti la infanojn. Ŝajne li venis en konvena tempo al la turo. La infanoj sidis en iu turprofundaĵo kaj plengorĝe kantis — ĉiuokaze angle:

King John has many a whim
and this is one.

(Reĝo Johano havas amason da kapricoj kaj jen unu el ili.) La kanteto ĉirkulis jam antaŭe sur la lipoj de la civitanoj, kaj la rezulto de la eksperimento supozeble ne kontentigis la scieman reĝon. Ni tamen povas sen eksperimentoj interkonsenti pri tio, ke la lingvo estas socia rimedo, kaj sekve ĝia evoluo sekvas la samajn leĝojn, kiuj validas por aliaj sociaj fenomenoj.

Antaŭ ol ni parolos pri tiu leĝo, ni donu ekzemplojn pri tio, ke en ĉiu lingvo ekzistas artefaritaj formoj. Tiaj formoj naskiĝas konstante. Oni ne bezonas amasigi tiajn ekzemplojn, unu sufiĉas. En la franca lingvo oni nomas antaŭtagmezan prezentadon "matiné". Preskaŭ ĉiu eŭropa lin-

gvo pruntis tiun vorton. En Svedlando la vorto ekzistas ne nur en tiu originala formo, sed ĝi kombiniĝis tre kurioze kun la sveda vorto "natt" (nokto), kaj tiel naskiĝis la vorto "nattiné", kiu signifas noktan prezentadon. (La vorto "matiné" en la sveda uzo signifas ne nur "matenajn" prezentadojn sed entute nevesperajn.) "Nattiné" certe estas bonega esprimo, kaj svedaj oreloj ne ribelas kontraŭ ĝi, sed ĉu por francoj tia kombino de du lingvoj ne estas kurioza, tio estas alia demando. Ni ne prenu alian specimennon el la armeo de tiaj ekzemploj, sed anstataŭe menciuj almenaŭ du ekzemplojn, kiam kreiĝis aŭ radikale ŝanĝiĝis lingvoj pro la intencita enfluo de artefaritaj lingvoelementoj.

La unua estas la sanskrita lingvo. Ĝi estas prackzemplo pri artefarita lingvo, plejparte skriba. Esence ĝi estis reunuigo de la disbranĉiĝinta veda lingvo, kies uzantoj pro geografiaj kaj aliaj kaŭzoj tiom dispecigis la lingvon en dialektojn, ke por la komuna kulto kaj religiaj skribaĵoj la pastroj bezonis krei reunuigitan komunan lingvon. Tiu lingvo ankaŭ nun estas speciale literatura lingvo en Hindujo.

La dua ekzemplo estas multe pli nova. Post la franca revolucio, ĉirkaŭ la jaro 1800, en Hungarlando komenciĝis literatura tendenco, kies celo estis redoni al la nacia lingvo tiun rolon, kiun ĝi dum la jarcentoj perdis pro politikaj kaj sociaj kaŭzoj. Dum longaj jarcentoj la lingvo ververe vivis nur sur la lipoj de la "popolo". La pli altaj klasoj uzis preferenc la latinan, la germanan kaj eventuale la francan. La progresema verkista skolo konstatis, ke la unuflanka uzado de la lingvo senigis ĝin de valoraj kordoj. La instrumento estis difekta. Speciale traduki en la lingvon, estis ofte nesolvebla problemo. Kaj nun sekvis unu el la plej interesaj kaj plej kuraĝaj eksperimentoj en la moderna kulturhistorio. Oni kreis amasojn da vortoj, formoj kaj eĉ finaĵoj, kaj malgraŭ la forta konservativa reakcio ili grandparte ekvivis en la lingvo. Ili vivas ankaŭ nun kaj donis tian puŝon al la lingva evoluo, ke nuntempe la hungara lingvo apartenas al la vortriĉaj lingvoj. Tiaj ekzemploj facile venkas antaŭjuĝojn. Tiaj ankaŭ nuntempe estas aŭdeblaj kontraŭ la artefaritaj (t.n. nenaturaj) lingvoj. (Ke ekz.

Esperanto esence ne estas "artefarita", pri tio ni ne nun parolu.)

Sed: kiu estas la leĝo de la socia evoluo? La vivo de la individuo same kiel tiu de la socio konsistas el bezonoj. Oni bezonas manĝaĵon, oni bezonas loĝlokon, oni bezonas sekurecon ktp. La tuta historio esence estas rakonto pri tio, kiel la homaro serĉas la plej proksiman vojon inter la diversaj bezonoj kaj iliaj kontentigoj. La historio de ekz. lumigo estas rakonto pri tio, kiel la homoj iom post iom trovis la plej mallongan vojon inter la lumbezono kaj ĝia kontentigo, t. e. la elektra lumo. Jen la leĝo: la homo serĉas ĉiam la plej mallongan vojon inter la bezono kaj ĝia kontentigo. Sed la evoluo mem kreas novajn kaj novajn bezonojn. Ni pensu pri la bezonoj de la nomada socio kaj pri la novaj bezonoj de tiu tempo, kiam agrikulturo ligas la homojn al unu loko, kaj fine pri la bezonoj de la industria socio.

La akcento de tiu ĉi regulo estas sur la vorto "serĉi". Oni serĉas tiun plej mallongan vojon, sed oni ne tuj trovas la ĝustan manieron, plej ofte ĉe tre malrapide. Kiel bremsado de troa rapido funkcias la konservativismo de individuoj kaj amaso. Entute tiu vojo de serĉado ne estas rekta kaj ne ĉiam eckonscia, sed ĝi rilatas ĝenerale al — ni diru — la ideala vojo de evoluo, same kiel la vojo de migranto al tiu de lia hundo. Ankaŭ la hundo venas al la sama celo sed post multaj kurboj.

Ankaŭ la lingvo estas solvo de bezono, kaj ĝia celo estas laŭeble plej kontentige solvi sian taskon. Tiel ni alvenis al la problemo de internacia lingvo. La unusola "universala" lingvo, t.e. unu lingvo por ĉiuj terloĝantoj, estas revo, kaj pri tio ni ne okupas nin sed preferu pri la sorto de la internacia helplingvo dum la jarcentoj. La celo de tiu ĉi skizo estas lumigi per kelkaj lumstrioj la vojon de la evoluo kaj pruvi per ekzemploj, ke la ideo pri internacia lingvo kiel ĝenerala homa bezono jam antaŭ multaj epokoj troviĝas en la homa cerbo, sed ĝi konkretiĝis nur tiam, kiam la bezono iĝis aktuala kaj motivita. El tiu ĉi pritrakto ni intence ellasas t.n. senvortajn lingvoprojektojn, signallingvojn kaj

ankaŭ la gestlingvojn; ni pensas konstante nur pri la vortigitaj kaj skribeblaj lingvoj.

Ni ne restu longe ĉe la konstanta rekvizito de esperanto-propagandaj paroladoj, ĉe la Babela turo, kiu legendo krom en la Biblio aperis ĉe kelkaj orientaj popoloj. La konstruo de tiu turo sekvigis Dian punon: la malbenon de lingvokonfuzo. Jen la unua konkretigita revo pri homa interkompreniĝo. Ĝi restis nur revo tiam, ĉar la vera bezono ne ekzistis.

Sed ni rapidu! Ĉu la latina lingvo ne estis internacia lingvo? La roma imperio estis mondpotenco, kaj la latino estis administracia lingvo en vastaj teritorioj, sed la "barbaroj", la loĝantaro de la invaditaj landoj, tute ne aŭ tre mal multe parolis la latinan lingvon, same kiel la angla lingvo restas multloke nur administracia lingvo kaj nur kriple enpenetras en parton de la indiĝena amaso. La latina lingvo ne povis tiam servi kiel internacia helplingvo vere kaj konkrete, ĉar nek la socia evoluo nek la tiama tekniko motivis la ekziston de vere internacia interkompreniĝilo. Estas interese, ke la internacia rolo de la latina lingvo solidiĝis tiam, kiam la mondpotenco malaperis. En la mezepoko la latino iĝis ĝenerala lingvo de la pastraro kaj sciencularo, kiuj estis proksimume samklasaj. Fakte estis nur tiu klaso, kiu bezonis internacian interligilon. La granda amaso pro la feŭda sistemo estis senigita de laobleco movi sin de sia loĝoloko. La teknika evoluo estis primitiva, la vojoj estis malbonaj, la publika sekureco ne estis firma. Mejloj kaj kilometroj reprezentis tro grandan baron, kaj pro ĉiuj tiuj kaŭzoj la bezono de internacia lingvo ekzistis maksimume nur kiel bezono de skriblingvo — por la ekleziuloj kaj scienculoj. Inter ili jam tiam multaj sentis, ke la latina lingvo multrilate malmoderniĝis kaj ne povas kontentigi la bezonojn. Ĝiaj mankoj pli kaj pli akre konturiĝis. Tial fariĝis pli konkreta en tiu epoko la penso pri internacia lingvo, sed responde al la bezono de skriba lingvo la unuaj pensoj kaj projektoj estis skriblingvaj projektoj (pasigrafioj). Tiuj projektoj prezentis skribsistemojn, kiuj ne celis esti parollingvoj. Por komprenigi, kiaj estis tiuj projektoj, ni

pensu pri la 400 milionoj de Ĉinujo, inter kiuj ekzistas 9 tute diferencaj lingvoj. Sed la ĉina skribo estas sistemo de signoj, kaj ĝi estas absolute unueca por ĉiuj tiuj lingvoj. Se ni ekz. supozas, ke ekzistas signo, kiu signifas "tablon", tiu signo estas diverslingve legata en la diversaj partoj de la granda ĉina regno. La mezepokaj kaj postaj skribsistemoj uzis plej ofte ciferojn kaj nombrojn, kiujn oni devus povi deĉifri en naciajn lingvojn. Tiu ĉi ideo havas nevenkeblajn obstaklojn, speciale tial, ĉar ĝi premisas *l o g i k o n* en la lingvoj, kaj oni apenaŭ povas diri, ke lingvo kaj absoluta logiko estas nedisigebla amparo. Oni denove povus amasigi ekzemplojn pri tio, sed eble sufiĉas, se ni indikas pri la spritaĵoj kaj ŝercoj, kies granda parto ĉerpas el la fonto de la lingvaj nelogikaĵoj. Jen sola ekzemplo: Sinjorino: Ĉu vi aŭdis, ke ĉiu tria novnaskito estas ĉino? La alia sinjorino: Kiel feliĉe, ke mi havas nur du infanojn! — La ekzemplo klare montras, kiel oni povas uzi la malprecizecon de la lingvo. Kaj nun aldonu, ke diversaj lingvoj forŝoviĝas al diversaj ekstremoj de la lingva mallogikeco. Esperanto ne havis tro altajn logikajn pretendojn, kaj tial ĝi povis ekvivi kaj povas vivi, sed la skribaj lingvoj pretendis laŭ la naturo de la afero absolutan logikon, kaj sekve ili kolapsis antaŭ la ekuzo. Sed — laŭ la bezono — tiaj skriblingvaj projektoj eĉ post la mezepoko okupis la pensojn de multe da geniaj kapoj, ĉar oni pli kaj pli klare sentis la moralan bezonon de internacia parollingvo. Tamen nenio motivis konkretan kreiĝon de tia lingvo, ĉar la socio kaj la tekniko ankoraŭ ne povis fundamenti tiajn dezirojn. En 1666 la granda pledanto de la homa optimismo, Leibniz, provis konstrui skribsistemon, sed tiu ĉi projekto restis nefinita, supozeble, ĉar Leibniz volis adapti la regulojn de matematiko kaj logiko al la interlingva projekto, kaj per tio ĝi estis mortkondamnita.

La sama jarcento estis epoko, en kiu la homa penso ekŝvingiĝis alten kun potenca forto. La jarcento estis heredanto de la antaŭa, kiun karakterizis disvastiĝo de la libro-presado, la grandaj mondvojaĝoj kaj la reformacio; kaj ĝi estis antaŭulo de la jarcentoj, kiam la franca revolucio kaj

iom poste la angla industria revolucio donis flugilojn al la evoluo. Filozofiaj genioj, medicinaj, sciencaj, teknikaj malkovroj — tamen ankoraŭ ne en decida formo — karakterizas tiun jarcenton, kaj ne estas mirinde, ke ankaŭ la ideo de interpopola lingvo povis fari duan grandan paŝon antaŭen; tamen precize nur tiom, kiom necese montris. Veraj genioj eksentis eblecon de internacia lingvo kaj montris la ĝustan vojon, sed en la praktiko naskiĝis t.n. apriori-lingvoj, pri kiuj ni tuj parolos. Sed unue kelkajn vortojn pri genioj. Krom Leibniz, ankaŭ Descartes (1596—1650) okupis sin pri tiu penso, kaj lia eldiro estas citinda: "Artefarita lingvo estas ebla, kaj oni povas trovi la scienccon, de kiu ĝi dependas. Per la helpo de tiu lingvo vilaĝano juĝos pri la esenco de aferoj pli facile ol nuntempe filozofoj. Tiu lingvo havos nur unu specon de konjugacio, deklinacio kaj vortkonstruo." En la daŭrigo Descartes antaŭdiris la afiksantan sistemon de la alvenonta lingvo kaj aldonis, ke eĉ simplaj kapoj povos ekposedi tiun lingvon dum la daŭro de ses monatoj. Zamenhof ne konis la eldirojn de Descartes, kiam li formis sian projekton tute laŭ la descartaj principoj. Alia geniulo, la ĉefo Comenius (1592—1670) esprimis similan ideon. Estas interese konstati, ke Comenius antaŭdiris ne nur la alvenon de mondlingvo, sed ankaŭ tiun de telefono kaj radio, tio en epoko, kiam oni apenaŭ komencis palpi ĉirkaŭ la elektraĵoj kaj kredis teoriojn pri la besta magnetismo sur bazo de — post morto — skuiĝantaj ranofemuroj. Sed Comenius — antaŭ 300 jaroj — antaŭdiris, ke venos tempo, kiam homoj, vivantaj sur la diversaj bordoj de la oceanoj, povos aŭdi parolon kaj muzikon en la sama momento, kiam ili eksonas.

Leibniz estis dudekjara junulo, kiam li aperigis sian projekton. Descartes kaj Comenius estis intuiciaj fenomenoj, kaj tiuj intuiciaj pensoj de la du lastaj estas veraj lumpunktoj. Sed aliflanke la realigo de la ideo ligas sin al la bezonoj, kaj kvankam nun la penso iĝas pli konkreta, ĝia realigo pro sia neaktualeco ne atingas la klaran penson de la descarta eldiro. Nun naskiĝas lingvoj, kiuj estas parolaj, sed ili en sia strukturo klopodas ligi sin al la penso

de Leibniz, t.e., ke la internacia lingvo devas esti logika, matematika sen kompromisoj. Tiuj lingvoj estas la t.n. apriori-lingvoj, kies vortoj estas kombinoj de arbitraj lingvoelementoj kaj havas nenian koncernon al la naciaj lingvoj. Ili estas lingvoj por si mem. Du ekzemploj povas karakterizi tiun specon de artefaritaj lingvoj. Ambaŭ estas malfruaj fruktoj de sia speco, devenantaj el la XIX-a jarcento. La unua estas verko de hungara pastro kaj profesoro, Andreo Réthy (1821). Laŭ la latina antaŭparolo Réthy oferis dek jarojn por krei tiun lingvon; se oni pripensas, ke tuta homa vivo estus necesa por lerni la lingvon, oni ne povas konsideri tro longa tiun tempon. Réthy elektis kun granda zorgo la vortojn de sia lingvo. Li kreis ĉ. 4000 t.n. fundamentajn ideojn. Unu el ili estas la ideo de la tempo. Ĝia ekvivalento en la lingvo estas p h a k. Kaj nun la kvar sezonoj fariĝas ph ek, ph ik, ph ok, ph uk, la kvar lastaj monatoj aph uk, eph uk, iph uk, oph uk. Tiu lingvo estas karakteriza ekzemplo pri la apriori-lingvoj, sendube tre kurioza kaj laŭ sia aspekto preskaŭ taŭga por matena pulmo-gimnastiko. — La alia ekemplo estas la lingvo S o l r e s o l, konstruita de Sudre (1866). Tiu lingvo estis kombino de la sep muziknotaj nomoj: do-re-mi-fa-sol-la. Sekve tiu ĉi lingvo teorie estis ne nur parolobla, sed ankaŭ muzikebla, kantebla, kaj tiuj teoriaj avantaĝoj kaj la naskiĝinta bezono kaŭzis, ke Solresol atingis certan popularecon — anticipan en sia epoko —, sed poste oni konstatis, ke sub la teoria belco kaj perfekteco kaŝas sin nevenkebla malfacileco. La apriori-lingvoj estis preskaŭ nelerneblaj. Kaj en tiu tempo tamen jam trafikis vagonaroj!

La penso pri la internaciigo de iu granda nacia lingvo jam delonge fantomas. Ekzistas rektaj proponoj, kaj ekzistas proponoj pri simpligo de ĉiuj grandaj lingvoj amase. La akcepto de iu nacia lingvo kiel internacia helplingvo povas esti diktata, sed verŝajne ne akceptata. Ĝi havas moralan malhelpon, t.e. ke ĝi perfortas la kulturon de aliaj popoloj sen reciproka interŝanĝo de kulturvaloroj, kaj fine ĝi vekas kontraŭstaron en ĉies animo, kies gepatra lingvo estas alia. Eksurbestro Lindhagen kutimas rakonti epizodon.

Li vizitis Ruslandon kelkajn jarojn antaŭ la morto de Lenin. Li renkontis eĉ la rusan ŝtatestron, kaj i. a. ili parolis pri la mondlingva problemo. Lindhagen rekomendis Esperanton. Esperanto ja estas mondlingvo. Ĉu ni bezonas ĝin? diris Lenin. Kial? Ni jam havas kvar mondlingvojn: la anglan, la francan, la germanan kaj la hispanan, kaj nun ni baldaŭ havos kvinan, la rusan. Kial ni bezonus sesan, Esperanton? Tiu epizodo eĉ en sia ŝerca formo klare montras la esencon de la problemo. La ideo de internacia lingvo preferiras tiujn pensojn, kaj esperantistoj ne bezonas havi timon aŭdante pri projektoj, kiel "Anglic" aŭ Basic-English.

Ĉiokaze ni alvenis en nia rapida vojaĝo al la dua duono de la pasinta jarcento, kiam aperis la vaporlokomotivo, poste telefono, telegrafo, aŭtomobiloj kaj aeroplanoj. Ĉiuj tiuj eltrovaĵoj, malgraŭ ĉiu erarvojo, fine gvidos la homojn al la sola racia penso, ke la malpliiginta baro de mejloj kaj kilometroj devas efiki utile kaj ne detrue al la homaj interrilatoj. Estas klare, ke la apero de tiuj inventaĵoj jam nun tute konkrete aktualigis la ideon de interpopola lingvo. Sed antaŭ ol ni alvenos al la modernaj projektoj, ni povas konstati, ke speciale la fakuloj povas esti rigide rifuzemaj al modernaj pensoj. Meze de la pasinta jarcento la intereso pri la ideo estis jam tute matura, kaj en Parizo fondiĝis Internacia Lingvista Societo por esplori la eblecojn de artefarita lingvo. Tiu societo ricevis memorandon de iu membro, Vaillant, laŭ kies opinio "universala lingvo ekzistas, oni devas nur elekti la internaciajn elementojn kaj radikojn de la ekzistantaj lingvoj". Tiu opinio ricevis malaprobbon, ĉar la komitato staris severe sur la platformo de la apriori-lingvoj, de lingvo logika kaj matematika. Feliĉe la vivo ne dependas de teoriaj elpensaĵoj kaj ne ĉiam aprobas ilin. En la historio de la internacia lingvo ni tiel alvenas fine al la epoko, kiam la teknika kaj socia evoluo aktualigas la problemon de helplingvo. Kaj kiam la bezono iĝis aktuala, estis nature, ke laŭ la cirkonstancoj de la aktualeco naskiĝis kaj kreskis verkoj, kiuj reprezentis la sole ĝustan ideon, t.e. ideon en la spirito de Descartes kun aldonado de tio, ke tiuj projektoj bazis sin sur la ekzistantaj

lingvoj. Se la unua de tiuj aktualigintaj projektoj, Volapük, ne montris sin evolukapabla, la dua, nia Esperanto, ankoraŭ ĝis nun montris sin vivkapabla kaj firme radikiĝinta lingvo, kaj ne estas utopio la kredo, ke ĝi kun siaj evoluaj eblecoj gvidos al solvo de la interpopola lingva problemo. Ĝi spitis du militojn, spitis konservativemon, spitis konkurencon, kaj ĝi certe spitos malhelpon ankaŭ estonte. Tio dependas tamen ne nur de la lingvo, sed ankaŭ de la esperantistoj. Tion ni ne forgesu!

Literaturo: Dresen "La historio de la mondlingvo". — Ráth Végh: A könyv komédiája. (La komedio de la libro.) F. Móra: "La antaŭuloj de Esperanto".

Memoroj kaj impresoj de estona rifuĝinto

De REIN KAPPER

(Eksprezidanto de la Estona Esperanto-Asocio)

Estonio — la plej mangranda ŝtato en la norda Eŭropo. Loĝantaro 1.115.000. Vi svedaj esperantistoj konas ĝin verŝajne, ĉar ni ambaŭ havis ja Esp. Turistajn Komisionojn, kiuj aranĝis multajn ekskursojn reciprokajn. Vi vidis kiel kreskis en Estonio materiala kaj spirita bonstato dank al persista laboro de la estona popolo.

La antaŭajn grandbienojn, kies posedantoj estis germanaj nobeluloj, la estona registaro devige aĉetis de ili, dividis en malgrandajn bienetojn kaj donis al terkulturistoj. Efektivigis la 700-jara revo de la estonoj! Denove ili havis teron por agrikulturo! Propran teron!

Kaj kia vivo komenciĝis! Elkreskis novaj domoj en kamparo kaj en urboj. Novaj fabrikoj kaj uzinoj, lernejoj kaj teatroj, bibliotekoj kaj societaj domoj. Ekfloris la esperanta movado. Preskaŭ 1.000 gesamideanoj en la tuta lando. En la Tallinna societo "Espero" la biblioteko konsistis el pli ol 1.000 libroj.

En la interno de la tero oni trovis oleoskiston, kaj el ĝi oni produktis oleon, benzinon, asfalton, kaj eksportis ilin en diversajn

landojn. Agrikulturo donis superfluan da produktoj. Oni eksportis ankaŭ ilin. Kial do ne vivi! Sed ne!

La jaro 1939. Ekplodis la milito inter la grandŝtatoj. Kaj baldaŭ la militaj ondoj tuŝis ankaŭ la malgrandajn. — Sovetunio postulis bazojn por sia armeo. Oni devis doni. La apetito kreskis, kaj en la jaro 1940 Sovetunio uzurpis la tutan landon kaj detruis la sendependan ŝtaton.

Venis novaj majstroj el oriento. El oriento lumo, oni diras! Jes, suna lumo, religia lumo, homeco: Buddha, Jesuo Kristo. Sed — ne tio nun!

Venis homoj ĝis dentoj armitaj, kreskintaj izole de la aliaj eŭropaj popoloj, kun tute alia koncepto pri la vivo. Kaj oni komencis perforte planti sian kulturon en popolo kun demokrata koncepto. Oni forprenis havaĵojn, ne nur grandajn sed ankaŭ malgrandajn. Oni arestis ne nur maturajn sed ankaŭ gejunulojn.

Sed pli terure: el gejunuloj oni organizis grandan reton de spiono. Oni subpremis la nacian senton, oni malpermesis nacian himnon, nacian flagon, naciajn kantojn. Oni malpermesis semajnaj kaj monatajn esperantlingvaj radiosendojn. Oni fermis esperantosocietojn. La esperanta movado mortis.

La perforto naskigis opozicion. Timante arestojn homoj forkuris en la arbarojn, ŝanĝis loĝlokojn, organizis taĉmentojn kaj kun armiloj en la manoj defendis sian vivon. Kaj nun venis la plej terura, satana nokto, la 13—14 de junio 1941.

En la tuta lando dum tiu nokto oni arestis 14.000 estonojn, tutajn familiojn, disigis edzojn de edzinoj kun infanoj, sidigis ilin en apartajn vagonojn kaj forveturigis ien. Kien, ni ne scias, eĉ ĝis nun. Nur deko da leteroj venis poste en Estonion, en kiuj virinoj priskribis, ke ili vivas en neimagbla mizero. Pri viroj oni nenion plu aŭdis. Kaj post tio la vagonaroj ĉiunokte veturis orienten. Veturigis senkulpaĵajn homojn al mizero kaj morto!

La 22-an de junio 1941. Ekplodis milito inter Germanujo kaj Rusujo. Mobilizo. Denove kelkaj dekmiloj da estonaj viroj estis devige forprenataj de siaj familioj kaj veturigataj orienten en Siberion, kie oni laborigis ilin en arbarojn. Malvarmaj loĝejoj, malsato, malsanoj, mizero kaj aro da mortintoj.

Alproksimiĝis germana armeo al Estonio. Ĉiuj estonoj sentas malnovan, centjaran malamon al germanoj. Sed nun tamen, terura afero, ili devas akcepti ilin kiel savantojn! Ĉar ili savas la estonojn de la forpelo al Azio, Siberio.

Okupis nian landon germanoj. Faŝista reĝimo! Laŭnome eĉ socialista. Sed, ho ve! Denove arestoj, mortigoj. Okazis, ke ili estis preskaŭ same sangruĝaj, nur sub alia nomo. Sed tamen oni povis libere spiri, dormi kaj entute vivi. Oni povis kanti la nacian himnon, havi la nacian flagon. Sed la ekonomia politiko

estis sama: elpremi el Estonio kiel eble plej multe. Ĉion eksporti al Germanujo. Ankaŭ homojn. Ne devige, kompreneble, sed pli ruze, sub la nomo de laboristoj bone pagotaj.

Kvankam Estonio perdis jam preskaŭ 100.000 de sia malgranda loĝantaro, kvankam mankis labormanoj en la propra lando, tamen sub la influo de koncerna propagando multaj junaj homoj veturis al Germanujo, ĉar ili timis ankaŭ la revenon de rusaj komunistoj.

Ekvalidis la normigo de manĝoproduktoj. Normigitaj prezoj. Tuj eksentiĝis manko de varoj, de manĝoproduktoj, ĉar la racioj estis tro malgrandaj. Komenciĝis spekulacio, ŝtelado.

Seniluziigo. La tiel nomataj savantoj fariĝis mem rabistoj. Denove deviga mobilizo. Homoj forkuras en arbarojn, eksterlanden.

La 9-an de marto 1944. Rusaj flugiloj super Tallinn. Miloj da bomboj. Terura nokto, ĉar ĉie brulas! La kvarono de la urbo, domoj, teatroj, malsanulejoj kaj preĝejoj brulas. La homoj forkuras, falas, mortas! Nova mizero.

Aŭtuno 1944. Alproksimiĝas la ruĝa armeo, kuras returne la faŝista. Denove t. n. "savantoj". Arestoj, torturoj, mortigoj, malsato, mizero, forveturigo en Siberion. Terure! Ne, savu sin, kiu povas! Kien? En Finnlandon, en Svedujon.

La ŝipo alproksimiĝas al Svedujo. Ĉiuj estas ĝojaj, ke neniu torpedo trafis la ŝipon. Jen, la sveda tero, ni staras sur la kajo. Ni estas savitaj.

Elektra lumo, ĝentilaj kaj helpemaj oficistoj, buterpanoj kaj lakto, multe da lakto, kion ni urbanoj de agrikultura lando ne havis jam de tri jaroj. Kaj dormo en sekuro kaj sonĝo en ĉielo!

Ĉu povas esti pli feliĉaj homoj ol ni? Estu benata la libera, demokrata Svedlando!

Franca vilaĝo

De CLAUDE PLANUS

Juna franco pasigis unu jaron en Dalekarlio kiel rifuĝinto. Tie li iam konatiĝis kun esperanto kaj verkis por M.E. tiun ĉi skizon pri la vivo en izolita franca vilaĝo en la Pireneoj dum la tempo de okupado.

Mi konatiĝis kun tiu vilaĝo en marto 1942. Bombo detruis la domon de miaj gepatroj, kaj por kelkaj monatoj ili devis rifuĝi al iu familio, kiu loĝis tie jam dum pluraj generacioj.

Estas malgranda vilaĝo tute sub la ĉielo, kie fontoj, ar-

boj kaj domoj havas aerecan aspekton, t. e. aspekton de vivo ne tereca. Tamen troviĝas tie urbestro kaj pastro, vendejo kaj forĝejo, pavimita strato kaj fluanta akvo en la biendomoj. Somere venas urbanoj por pasigi la libertempon tie, vintre venas skiantoj. Ĝi similas al miloj da aliaj montovilaĝoj, kaŝita inter rokoj kaj abioj. Tamen oni konas Parizon. Julien estas sekcia estro en Galcrie Lafayette. Post la militkomenco liaj gepatroj sendas al li pakaĵojn kun sangokolbaso, ovoj, butero kaj fromaĝo, ĉio bone kaŝita en brasikokapoj, el kiuj oni elprenis la internon. Ili petis lin reveni al la bieno por anstataŭigi sian fraton, kiu estas kaptito. Sed ŝajnas, ke lia edzino ne volas forlasi la urbon kun ĝiaj ligoj kaj kutimoj . . .

Toulouse oni konas pere de Marie, la filino de maljuna Corbard, kaj Marseille pere de Juliette kaj Hélène, la filinoj de la vendisto, ambaŭ tre burĝe edziniĝintaj tie. Victor estis kaporolo 1914—1918 en "la oficejoj". En unu spiro li diras la ĉefurbojn de ĉiuj gubernioj de Francujo, oni absolute ne estas kredinta, ke tiom troviĝas. La junaj, kiuj partoprenis la militon 39—40, konas pli bone la realan geografion de la lando, sed ili ne parolas, kaj tamen kelkaj el ili estis eĉ en Belgujo. Tiu venkita generacio de montaj kampuloj ne konas la ĝojon de senutilaj diskutoj, de tuta liberigo post longa labortago sur kampoj aŭ en arbaro. Ili ne parolas, ne legas, ne aŭskultas radion. Kion ili pensas pri la milito, pri la malfeliĉoj de Francujo?

Kiam la germanoj invadis la sudon, mi vidis tiujn junajn nokte fosi truojn en la kampoj: profundajn truojn ne atingeblajn por plugila tranĉfero. En la fino de la posta tago ili iris ĉasi kiel en ĉiuj sabatoj, sed ili revenis sen pafiloj. Kaj dimanĉe la rezerva pafilo, bela mekanikaĵo de precizeco, kiu havas honorlokon super la pordo en la manĝoĉambro, servas por dua pretendita ĉaso, kaj denove ili revenas kun malplenaj manoj. Mi tuj komprenis iliajn pensojn, kaj la nekredebla kamparana antaŭvido igis min ridi: neniu homo en la vilaĝo renovigis sian ĉaspermeson!

Estas vilaĝo simila al tiom da aliaj, kun lernejo, monumento al mortintaj soldatoj kaj komunuma virbovo. La

lernejo havis skandalon, ĉar ĝi estis konstruata sur tereno apartenanta al la urbestro — maltaŭga tero kaj malbona situo, mono perdita. La monumento al mortintoj havis skandalon. La rokpeco, malbone skulpita en formo de virino, sur kies antaŭtuko troviĝas la nomoj de la viktimoj, kostis mil frankojn por ĉiu mortinto. Finela komunuma virbovo estis skandalo, ĉar evidente ĝi malbone estis zorgata kaj nutrata de la bienuloj, kiuj havis la taskon tion fari. Skandaloj estis la akvoinstalo, la arbarkoncesio, la publika lavejo, la akvuma kanalo. Kiam la urbestro estis lernanto en la teknika lernejo de la provinca ĉefurbo, li havis infanon kun knabino, kaj la pastro, "sankta homo, domaĝe ke tiel ebria", havas fratinton, kiu devojiĝis. Gardu vin kontraŭ "la soldato", kiu dum diskuto detiris fingron de la brava Victor. La leterportisto havas frencan edzinon. La bona virino en la tabakvendejo estas malvirta. La sekretario de la urbestro estas ĝibulo, malica kiel simio sed hipokrita. La forĝisto — malnova ĝendarma adjutanto — iam akuzita pro falsigo. Kaj Leblanc? Levu la ĉapelon antaŭ li! Ĉiuj diras, ke tiu kompatindulo venenis sian edzinon, sed tio ne estas vera. Estas ĝentila tipo, honesta homo. —

Estas vilaĝo en trankvilo, sur altaĵo senfama. La grandvojo estas kvin kilometrojn malproksima. De la okupado eĉ la aŭtobuso forlasis la vojon de la montaro. Bona afero por eviti enlistigon aŭ rekvizion. Eĉ la germanoj ne venis tien.

Estas vere monta vilaĝo. Bonodora sekala pano venas el la fornoj. Porko mortas, antaŭ la leĝa deklaro, de iu stranga malsano, kiu pli rilatas al gastronomio ol al bestkuraca scienco. La ŝafoj suferas de malfeliĉa naskomanko. De tempo al tempo oni sendas sakon da terpomoj aŭ dumonatan bovidon al la ĉefloko de la distrikto.

Nenio okazas en la vilaĝo. Eĉ "Vichy" ne venis por kontroli. Oni eĉ ne anstataŭigis la urbestron de la malnova respubliko, ĉar neniam oni aŭdis pri li. Ĉu li havis eĉ politikan etiketon? Cetere, kion signifas urbestro de vilaĝo, kiu dum ses monatoj de la jaro estas kaŝita de neĝo, vilaĝo kun cent loĝantoj?

Pri la milito la loĝantoj konis nur la komunikojn de la nutraĵa komisiono. Tiuj tre interesis ilin kaj donis taskon por lamentado pri nunaj malfeliĉoj. Al ili mankis nenio. Kiam distingita urbano proponis plurajn milfrankajn monbiletojn por ŝinko, ili povis diri nur tute banale: "Kiom ĉiuj prezoj altiĝis!" Cetere tio estis vera. Ili ne faris la prezojn. Oni venis kaj "tiom" proponis. "Nepre ekzistas mono en la urbo", diris al mi Rochu, leviĝante la ŝultrojn. "Nepre ekzistas tie malsato", mi respondis, imitante lian sudan parolmanieron. "Bah", replikis li, "se tio almenaŭ mortigus la maljunulojn!" Kaj dezirante, ke mi ne interpretu false la sencon de la vortoj, li tute simple faris la faŝistan saluton.

Ne, Rochu verdire ne komprenis pli ol aliaj. La vilaĝo estis tro malproksima al la ĉielo. El la vilaĝo estis kaptitoj, for dum tri jaroj, malfeliĉaj en tiu malbenita Germanujo, kiu je fiksitaj tempoj aperis en la historio por batali.

Mi poste forlasis la vilaĝon por suriri en Marseille aĉan ŝarĝoŝipon, kiu trafikis la bordojn de Afriko. La dekan de novembro mi forlasis Bizerte, okupita de la italoj, kun la intenco provi atingi Alger, kie elŝipiĝis la amerikanoj.

La 11an je la deka kaj tridek matene germana torpedo finis tiun malgrandan fuĝon, kaj la 14an ni alvenis al Ĝenovo kiel kaptitoj.

Dekreto de Hitler ordonis liberigi ĉiujn kaptitojn de Tunisio, kaj unu monaton poste mi denove estis ĉe miaj gepatroj. Dume okazis gravaj ŝanĝoj en mia vilaĝo.

Kelkajn tagojn antaŭ mia veno oni eksciis pri la morto de Emile Barnellet, la malnova sekretario de la urbestro. Hajlon detruis parton de la rikolto, bovino mortis pro misonasko, kaj en la elektra seĝejo Basto, la hispano, perdis manon. Estis tiuj kvar eventoj, mi ĵuras, kiuj enigis la vilaĝon en la militon. Leblanc estis trovata pendanta de arbo. Sur lia tombo la urbestro dankis en la nomo de la helpkomitato "Griza stelo" la familiojn kaj membrojn de la societo pro tio, ke ili multnombre venis por honorigi la mortinton. Kaj li diris la terurajn vortojn: "Mi dankas ankaŭ la ĉielon" . . .

Pamus malaperis. Unu monaton poste la leterportisto

montris al la tuta vilaĝo karton, kiu venis el Hispanujo kaj diris, ke li bone alvenis. La filo de la forĝisto metis kuglon en sian kruron, kiam li provis revolveron. Ĉe Bouvier venis vizite misteraj homoj, kiujn li ofte akompanis sur la montara vojo. Iun dimanĉan matenon oni arestis lin. La pastro uzis la okazon por diri al la naŭ personoj, kiuj ĉeestis la diservon: "Per la helpo de Dio kuraciĝos ĉiuj malsanoj, Dio neniam forlasas tiujn, kiuj suferas pro la komplikco de malbonaj kuracistoj." "Ĉu vi aŭdis, kiel la pastro atakis Germanujon?" diris post unu horo la tuta vilaĝo.

Vichy sendis afiŝojn amase: pri brutodeklaro, deklaro pri semita tero, rikolta imposto, kalkulado de ŝafoj, kalkulado de judoj. Ili ĉiuj malaperis de la muroj. Nur unu solan oni lasis: "Revenu al la tero!" La kamparanoj aldonis al tio: "per motora kadavroveturilo".

En la kafejo oni povis ĉiuvespere aŭskulti radiajn novaĵojn el Londono, sed ne troviĝis multe por trinki.

Kaj jen iun tagon la urbestro transdonis al kelkaj fidiindaj amikoj sekretajn gazetojn, venintajn de la distrikta estraro, kiu petis, ke oni lasu la tutan vilaĝon legi ilin. Dum la publika parolado, ĉar la maljuna Corbard faris veran paroladon el tio, oni aŭdis elkriojn kaj komentojn. Ni estis naŭ ĉe la tablo en la ĉambro de Corbard. La leterportisto per sia giganta pipo faris teruran atmosferon en la mallarĝa ĉambro. Li eltrovis novan miksaĵon por fumi, faritan el mento, tilifolioj kaj iu sovaĝa herbo. Archat, kiu fumis veran tabakon, ĉar li havis tri filojn kaj unu onklon, kiuj ne fumis, plendis pro la malbonodoro. Fine oni diris al la leterportisto: "Tru bruligi vian fojnon aliloke!" Cetere oni baldaŭ disiĝis, ĉar ĉe Trillon du bovinoj estis naskontaj samtempe, afero kiu neniam antaŭe okazis en la vilaĝo.

Iun tagon oni eksciis, ke la edzo de Opportune estis mortkondamnita en Marseille. La vilaĝo ĉiam rigardis malamike la burĝojn, kiuj dum siaj libertempoj ĉion kritikis, sed nun ĝi havis la nekredeblan takton diri meson por lia memoro. La pastro bedaŭris tiujn, kiuj faras la juĝon, ĉar, li diris, Dio sola estas juĝanto. Li havis grandan penon diri la meson, la bona pastro, ĉar la saman matenon li frakasis

siajn okulvitrojn. Kaj la infanoj de la ĥoro, profitante la bonŝancon, estis pli malicaj ol iam.

Germana flugmaŝino frakasigis en la montaro, kaj la anoj pereis en brulo. Dum kvar tagoj malamika komisiono instalas sin ĉe ni por fari esploron kaj prepari la fortransporton de la maŝino. Por la unua fojo ni vidis "boŝojn". La malnova instruistino estis lasinta sian oficon, kaj juna knabino venis por preni ŝian lokon, kaj ĝuste tiun tagon, kiam foriris la komisiono, ŝi venis. Juna oficiro renkontis ŝin apud la preĝejo kaj komencis babili kun ŝi. Kvar vilaĝanoj vidis, ke ŝi post kelkmomenta konversacio vangofrapis la germanon. La oficiro foriris, kaj la historio ne havis sekvojn. Fraŭlino Suzanne fariĝis idolo de la vilaĝo, kaj la infanoj formis ĉirkaŭ ŝi delikatan trikoloran girlandon. En iu leciono, devige rezervita por la Marŝalo, la savinto de Francujo, ŝi diris la ĉarmajn vortojn: "La Marŝalo faris miraklan savon, li donis al Francujo klarvidon, kritikan spiriton, amon al la patrujo."

Tiu monta vilaĝo ne konis la okupadon. Sole Bouvier estis en malliberejo, ĉar li gvidis oficirojn, kiuj iris en Hispanujon.

Ne troviĝis germanoj en la vilaĝo, kaj ĉiu fieris pro tio. En certa maniero tio estis kvazaŭ persona venko. Fakte Francujo ne estis tute okupita. Kaj sur peco da libera tero oni parolis laŭte, firme diskutis, oni estis manpleno da amikoj de Francujo. Ĉiu nekonscie venis al la penso, ke li devas sole servi. Metode kaj persiste la kamparanoj preparis sin. Morgaŭ la liberig milito trovos ĉiun sur lia posteno kun propra pafilo en la mano.

Mi konatiĝis kun tiu franca vilaĝo. Oni manĝas bone tie, kaj oni havas varmon en la vintro malgraŭ la neĝo. Oni ŝpinas lanon, kaj oni faras ŝuojn. Estas feliĉa vilaĝo, kiu disponas ĉiujn tiujn naturajn riĉaĵojn, kiuj hieraŭ neniom valoris. Oni mokas tie la ordonojn de Vichy, kaj la germanojn oni ignoras. Estas vilaĝo, kiu havas neniom de terco, ĉar ĝi vivas ne sub la okupado.

Kaj tamen tiu izolita altaĵo estis kiel granda falombrelo, kiu iun tagon malleviĝos sur la ebenon kun sia tuta vira

loĝantaro je signo de la Urbestro — mi diras de la Urbestro, kiu estas estro de batalgrupo, unu el tiuj homoj al kiuj Francujo povas fidi.

Tradukis S. E n g h o l m.

Konfucio

De HÉLÈNE REYMOND

Nobla homa saĝeco venas el Ĉinujo, saĝeco, kiun Konfucio instruis 500 jarojn antaŭ Jesuo. Ni eŭropanoj devas konfuziĝi antaŭ tiu supereca sinteno de homo en ĉiuj rilatoj de la vivo.

Konfucio havis la plej altan ideon pri kulturado de si mem. De la imperiestro ĝis senranguloj ĉiuj homoj senescepte devas konsideri kulturadon de sia personeco kiel komenco de ĉiuj aferoj. Li diris: "Kulturado de personeco dependas de tio, kiom oni rektigas (= bonigas) sian koron." Kiel bela estas tiu parolo. Kiom da instruituloj en nia eŭropa societo rektigas unue sian koron? Li plue diras: "Dezirante rektigi la koron, vi unue tenu vian penson sincera. Dezirante teni la penson sincera, vi penu kompletigi vian scion." Li tre alte ŝatis la scion. "Por lerni, mi scias, estonto ne valoras nunan tempon." El pureco de koro aperas ĝentileco, kiu ne estas modaj, lernitaj belmanieroj, sed tiu ĝentileco estas apero de pura interno. "Kio vere ekzistas interne, aperas ekstere. Pro tio estas necese, ke supera homo estu singarda, dum li estas sola." Sur la bankuvo de reĝo Tang estis gravuritaj jenaj vortoj: "Renovigu vin ĉiutage! Renovigu de tago al tago. Kaj ankoraŭ renovigu ĉiutage!" Perfektiĝo de homo estas la komenco de la Granda Lernado. Kiam la personeco estas bone kulturita, tiam

la familio estas reguligata. Kiam la familio estas reguligita, tiam la ŝtato estos ordigata. Kiam la ŝtato estas ordigita, tiam la tuta mondo povos restadi en paco. Tio estas la Granda Lernado, per kiu la homaro povos alveni al paco.

Konfucio ankaŭ instruis pri la Mezeco aŭ la Kerno. La kerno estas vivkialo de ĉiu afero. La kerno entenas la vivon mem. La mezeco (alia vorto por la sama ideo) estas la granda radiko, el kiu ĝermas ĉiuj aferoj sub la ĉielo. La harmonio estas la ĝenerala vojo, sur kiu devas iri ĉiuj sub la ĉielo.

Konfucio diris: "La mezeco — jen la plej altgrada virto! Supera homo observas la mezecon, ĉar li kondutas kiel supera homo, ĉiuokaze laŭ la mezeco." Ĉiam same malproksime de ĉiuj ekstremoj estas la morala konduto.

Li ankaŭ insistas pri sincero. La sincero estas la vojo de la Ĉielo. Atingi la sinceron estas la vojo de la homoj. Nur la homoj plej sinceraj sub la ĉielo povas transformiĝi.

Disĉiplo demandis: Kio estas la virto de la homeco? La filozofa respondis: Ami la homojn, Li demandis pri la scio. La filozofa respondis: koni la homojn.

Aliloke li diras: La homo, kiu estas firma, pacienca, simpla kaj natura, modera en paroloj, alproksimiĝas multe al la virto de homeco.

Kaj: La homoj kun paroloj lertaj kaj ornamitaj, kun manieroj allogaj, estas malofte kapablaj pri la virto de homeco.

Antaŭ Kristo li jam diris: Agu al aliaj, same kiel vi deziras, ke oni agu al vi.

Oni demandis: Kion pensi pri tiu, kiu donas bonon por insulto? Konfucio diris: Se oni agas tiel, per kio ni pagos la bonon mem? Ni devas pagi malamon kaj insulton per pardono kaj bonfarojn per bonfaroj.

Konfucio diris ankoraŭ: Simileco ekzistas inter pafarto kaj la konduto de supera homo: kiam oni malsukcesis trafi celmarkon, oni sin turnu al si kaj serĉu la kaŭzon en si mem.

Riĉa estas la instruo de Konfucio. Ĝi atingas la altajn valorojn de homa penso. Sed ofte Konfucio devis diri: An-

taŭ tiuj, kiuj ne penas kompreni, mi rifuzas eldiri miajn pensojn.

La Japana Esperanto-Instituto aperigis en esperanto libron pri Konfucio: La Granda Lernado kaj doktrino de Mezeco.

Kvar malnovaj kamaradoj

Interparolo.

De P. TH. JUSTESEN

PERSONOJ:

Ingeniero
Kuracisto
Kolonoelo
Pastro

Inĝn. (al la kur.) — Bonege, kara amiko. Ni ĉiuj kun ĝojo aŭskultis vian rakonton. Sed ŝajnas al mi sensence, ke vi fariĝis esperantisto. Kion vi volas atingi per tia strangaĵo?

Kur. — Tio estas klara. Mi volas partopreni ion, kion mi rigardas kiel gravan kulturelaboron, kaj cetere uzi la lingvon praktike.

Inĝ. — Kiel vi povas uzi ĝin praktike?

Kur. — Dum vizitoj al aliaj landoj kaj en interrilatoj kun la esperantistoj tie.

Inĝ. — Sed vi ja povas paroli plurajn respektindajn lingvojn. Ĉu ili ne taŭgas?

Kur. — Sed mi ne povas paroli ĉiujn lingvojn, kaj la esperantistojn mi trovas sole per helpo de esperanto.

Inĝ. — Nu, povas esti. Sed ĉu tio estas tiel interesa?

Kur. — En fremda lando unuopa esperantisto same multe valoras kiel amaso da ordinaraj fremdlandanoj.

Inĝ. — (al la kol. kaj la pastro). Tio estas flata por ni, Ni valoras parteton de esperantisto.

Kur. — Vi ja ne estas eksterlandanoj. Vi estas "ekster konkuro".

Pastro. — Sed diru, kiujn apartajn kvalitojn havas la esperantistoj?

Kur. — Nu, aŭdu! Mi ne volas esti sentimentalaj; sed verdire estas frateco inter ni.

Inĝ. — (ironic) Libero, egaleco kaj frateco!

Kur. — Jes, ĝuste tio.

Inĝ. — Kaj kian praktikan rezulton ĝi donos?

Kur. — Kie ajn en eksterlando mi trovas rondon da amikoj.

Inĝ. — Ankaŭ en la praktiko?

Kur. — En tre alta grado en la praktiko.

Inĝ. — Ne malbone. Ĉu tio validas ankaŭ por mi?

Kur. — Sendube — se vi estus esperantisto.

Kol. — Sed mi kredas, ke vi ne havas patrolandon.

Kur. — Tamen, absolute — eĉ du, nian propran kaj la mondon.

Kol. — Tio estas tro multe. Bona patrioto havas nur unu.

Kur. — Ne kredu, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj.

Kol. — Kaj se malamiko atakus vian landon?

Kur. — Tio estus tragedia situacio; sed ni farus nian devon.

Pastro. — Milito metas ĉiun pacamanton en malfacilan situacion. (Al kur.) Ĉu vi estas pacistoj?

Kur. — Ĉiuj esperantistoj estas pacistoj.

Kol. — Kiel oni povas esti pacisto en la jaro 1944?

Kur. — Milito ĉiam estas abomenaĵo, en tiu ĉi jaro kiel en aliaj. Ĉu vi ne povas konsenti pri tio?

Kol. — Ĝi estas abomena, sed necvitebla.

Kur. — Sed ni devas lerni eviti ĝin.

Kol. — Ŝajnas, ke homa historio sen milito estas neebla.

Cetere milito havas ja ankaŭ bonajn ecojn.

Kur. — Vere? Kiujn?

Kol. — Inter alie ĝi akcelas la evoluon.

Kur. — Mortigante la junulojn.

Kol. — Oni ricevas nenion senpage.

Kur. — Mortigante la junulojn la milito absolute malhelpos evoluon.

Kol. — Ĉu vi ne povas vidi, ke la milito solvas ŝajne nesolveblajn problemojn? Ĉu ĝi ne kreas tute novan mondon en la daŭro de malmultaj jaroj?

Kur. — Eble vi pravas; sed la prezo estas terura.

Kol. — Nu, mi ne havas entuziasmon por ĉio, kio estas nova; sed la milito estas vivo, kaj ĝi povas vekti inertan mondon. Kaj kia teknika progreso?

Pastro. — Kaj oceano da mizero!

Kol. — Ŝajnas, ke la celo de la vivo ne estas feliĉo.

Kur. — Sed kio?

Kol. — Tion mi ne scias. Demandu la pastron. Eble morto.

Pastro. — En ĉiu okazo ne tiu morto. Laŭ mia konvinko milito estas sekvo de homa malbono.

Kol. — Puno de la ĉielo!

Pastro. — Jes, puno de la ĉielo.

Kol. — Mirinda metodo. Oni kreas neperfektan homon, kaj poste oni punas lin pro tio, ke li estas neperfekta.

Pastro. — Li devas perfektigi sin.

Kol. — Tio estas granda tasko.

Kur. — Bela tasko.

Inĝ. — Senespera tasko.

Pastro. — Tute ne. Dependas nur de la volo.

Kol. — Forta penso!

Pastro. — Tute ne. Ĉu vi kredas, ke ĉiuj homoj estas same bonaj?

Kol. — Tion mi ne kuraĝas aserti.

Pastro. — Nu! Sed ni rajtas esperi, ke ĉiuj homoj kapablas atingi la punkton de la avangardo kaj ke tiu dume iras pli antaŭen.

Inĝ. — Jes, teorie oni ja povas pensi tian aferon.

Kur. — Ne nur teorie. Komparu la vikingojn kun nuntempaj homoj. Ĉu vi ne kredas, ke tio donus pozitivan plusvaloron?

Inĝ. — Mi ne povas nei tion.

Pastro. — Kaj per tio vi cedis vian aserton.

Kol. — Vivu la espero!

Pastro. — Jes, ĉar tiu kaj nur tiu povos porti la homaron antaŭen.

Kur. — Jes, sendube! Ni esperantistoj estas konvinkitaj pri tio.

Kol. — Vi estas naivaj.

Pastro. — Ĉu? Ĉu vi ne kredas la evoluteorion?

Inĝ. — Rokfirmc.

Pastro. — Ĉu vi ne kredas, ke la homoj en la ŝtonepoko estis naivaj?

Inĝ. — Jes, nepre.

Pastro. — Sed tio, pri kio ili ne povis eĉ revii, estas nun realaĵoj. Ni laboras per logaritmoj, radio kaj . . .

Kur. — Kaj esperanto.

Inĝ. — Muziko de estonto.

Kur. — Precize. Muziko de estonto; sed ĝi estas aktuala.

Pastro. — En la ŝtonepoko oni mortigis laŭ emo kaj kapablo.

Kol. — Jes, verŝajne.

Pastro. — Nuntempe mortigoj tamen estas esceptoj.

Inĝ. — Estas vere.

Pastro. — En la ŝtonepoko kristanaj idealoj estis nepensiblaĵoj.

Inĝ. — Kredeble.

Pastro. — Sed jam 400 jarojn antaŭ Kristo montris Sokrato, al kia alto povas levi sin la homa animo.

Inĝ. — Pri tio mi konsentas.

Pastro. — Kion konskvenca evoluiŝto do devas diri pri la eblecoj de la estonto?

Inĝ. — Tio fariĝos longa historio.

Pastro. — Jes, longa sed nekontraŭstarebla. Cetere la progreso nuntempe iras ja per pli kaj pli granda rapido. Baldaŭ ĝi estos kiel lavino.

Kol. — Sed en 1944 furiozas la plej detrua milito de la mondhistorio.

Pastro. — Jes, kiel vi mem diris: nenion oni ricevas senpage. Sed ankaŭ la epoko de militado estas finita.

Kol. — Vere?

Pastro. — Du grandaj potencoj luktos kontraŭ la milito.

Kol. — Kiuj?

Pastro. — La kristanismo kaj la juna virinmovado.

Kur. — Kaj — pardonu! — la esperantismo.

Pastro. — Bone, ni akceptos vin kiel kumbatalantojn. Neniu povos kontraŭstari nin.

Kol. (al inĝ.) — Kion ni diru pri tio, amiko?

Inĝ. — Eble ni povas partopreni en iliaj esperoj.

Kol. — Neniam. Oni militos dum eterna tempo. Kaj la nura ekzisto de milito montras la mankon de konsekvenco en la kristanismo. La malbono kaj aĉeco de la homoj estas kiel vermo, kiu mordas la radikon de la kredo. La supozo pri diablo cfikas kiel kancero. Kion diablo devas fari en mondo de absolute bona kaj ĉiopova Dio?

Kur. — Ne imagu, ke vi estas ĉioscia!

Kol. — Mi ne imagas. Sed mi rezonas laŭ nia fakta scio.

Kur. — Ĉu vi scias ion pri la rilato inter la konataj aferoj kaj la nekonataj?

Kol. — Certe ne; sed mi ignoras la nekonatajn aferojn.

Kur. — La rilato eble povas esti kiel inter unu kaj la senfineco.

Kol. — Eble. Pri la nekonataj aferoj mi ne okupas min.

Kur. — Eĉ se vi konsentas, ke ili enhavas senfinajn eblecojn?

Kol. — Jes.

Pastro. — Vi ne estas filozofa?

Kur. — Tute prave. Kiam oni parolas pri superhomaj problemoj, oni devas ne forgesi la superhomajn eblecojn.

Kol. — Ni ofte iras erare en klara taglumo. Ĉu ne tiom pli en la mallumo de la nekonataĵo?

Kur. — Sed inter la regionoj de la taglumo kaj la dirita mallumo estas la "lando de neniu", kie loĝas niaj nekklaraj sentoj kaj pensinklinoj, niaj "prapensoj", kiujn ni ne povas pruvi sed tamen insiste tenas.

Kol. — Kaj kiujn trezorojn vi povas elfosi en tiu regiono?

Kur. — Tion mi diros. Sed unue permesu al mi kelkajn demandojn. Ĉu vi povas kontentiĝi pri la mallongeco, necerteco kaj mizero de la vivo?

Kol. — Kara amiko! Tio estas ja la plej granda sensencaĵo en la mondo.

Kur. — Se vi estus ĉiopova, vi do aranĝus la aferojn en multe pli bona maniero?

Kol. — Se mi estus ĉiopova? Ĉu vi volas diri: se mi estus Dio?

Kur. — Jes, bone, ni diru tiel.

Kol. — Certe! En tiu okazo mi certe trovus pli bonan manieron. Ĝuste en tiu ĉi momento mi ne povas diri, kiel ĉio devus esti, sed tute certe mi eltrovus ion pli bonan ol estas tio, kion ni nun havas.

Inĝ. — Kompreneble vi farus la vivon pli longa, kaj vi prizorgus, ke nenio mankus al ni. Eble vi forigus ankaŭ la militon.

Kol. — Jes. Jes! Eble mi farus tion. Mi ne povas kompreni, ke Li ne faris tion.

Kur. — Tion ankaŭ mi ne povas kompreni, kaj ĝuste pro tiu kaŭzo mi kredas, ke Li tion faris.

Kol. — Kion vi volas diri per tio?

Kur. — Atendu momenton? Vi ja estas matematikisto. Kion vi opinias pri Gauss?

Kol. — La plej granda geniulo de la mondhistorio.

Kur. — Ĉu vi povas imagi, ke Gauss estus naskiĝinta en la ŝtonepoko?

Kol. — Stranga ideo? Tiutempe ja tute ne ekzistis matematiko.

Kur. — Li ja povus krei ĝin. Li povus desegni en la sablo kaj kalkuli per ŝtonetoj. Kial li ne trovus tuj la pitagorean teoremon kaj eĉ la logaritmojn?

Kol. — Ne, tian aferon mi ne povas imagi. La scienco devas evolui paŝon post paŝo.

Kur. — Mi ne povas kompreni, ke tio estas necesa. Ĉu ekzistas iu naturleĝo, kiu reguligas la longecon de la paŝoj?

Kol. — Ni ne vidis sciencon estiĝi tiamaniere. La naturo ne faras saltojn.

Kur. — Kial ne?

Kol. — Kial ne? Kial ne? Ĉu mi diru kial ne? Ĉar tio ne estas ebla.

Kur. — Mi diros, kial vi ne povas imagi tion. Estas pro tio, ke vi havas instinkton, senton, prapenson, kiu ne lasas vin kaj kiu diras al vi, ke la scienco nepre devas evolui paŝon post paŝo. Kaj vi estas tute prava.

Inĝ. — Mi konsentas kun la kuracisto. Sed de kie venas tiu sento?

Kur. — Laŭ Platono kaj diversaj aliaj saĝaj homoj tiaj sentoj havas sian radikon en malnovaj memoroj el pli fruaj vivoj, kiuj havas ombran ekziston en nia konscio.

Kol. — Kaj Gauss?

Kur. — Gauss tute simple dum longa ekzistoĉeno estis fanatika matematikisto. Eble li iam nomiĝis Arkimedo, kaj mi ne scias kio pli; sed lia genio nepre devas baziĝi sur sperto. Nur ekzercu faras majstron.

Kol. — Kaj tiajn aferojn vi kredas?

Kur. — Absolute. Ĉar mi postulas iun aŭ alian klarigon pri la fenomenoj, kaj senenhavaj vortoj ne sufiĉas por mi, kaj mi diras kiel vi: la naturo ne faras saltojn.

Kol. — Vi do kredas la doktrinon de reinkarnacio?

Kur. — Precize.

Kol. — Kaj tio faras vin feliĉa?

Kur. — Absolute! Tiu doktrino klarigas ĉion.

Kol. — Ekzemple?

Kur. — Unue ĝi montras, ke la evoluo pludaŭras. Ĝi faras la evoluon eterna.

Inĝ. — Jes.

Kur. — Duc ĝi forigas ĉiun maljuston. Kion ni semas, tion ni rikoltos. Ĝi diras al ni, ke nia nuna vivo estas guto en la oceano. Granda konsolo! Ĝi venkas la morton. La morto tute simple ne ekzistas.

Kol. — Jes! Se vi estas konvinkita pri tio!

Kur. — Mi estas.

Kol. — Tio estas ankoraŭ pli kurioza ol la esperantismo.

Kur. — Nun vi certe komprenas, ke kiam mi laboras por la esperantismo, mi tute simple laboras por mi mem.

Inĝ. — Kiamaniere?

Kur. — Mi ja revenos, kara amiko. Kaj se Esperanto en tiu tempo estos enkondukita, mi ne bezonos lerni tiom da lingvoj kaj verŝi tiom da latinaj larmoj. Mi gajnos oceanon da tempo al matematiko, naturscienco, ludo ktp. Kaj mi povos kompreni la radiajn sendojn el ĉiuj landoj.

Inĝ. — Sed vi ne povos memori vian nunan vivon.

Kur. — Ne. Sed ĉu ĝi valoras memoron? Mi volas komenci denove sur pli alta ŝtupo.

Inĝ. — Vivo, kiun vi ne povas memori, ne estas via.

Kur. — Ĝi estas necesa trapasejo.

Inĝ. — Tiel ekzistas nur unu lingvo en la mondo, Esperanto, mi supozas.

Kur. — Tute ne. En la ĉiutaga vivo oni kompreneble parolos la nacian lingvon. Nur en kunesto kun eksterlandanoj oni uzos la internacian lingvon.

Pastro. — Mi dubas, ke tiel okazos.

Kur. — Kial?

Pastro. — La historio de la Babela turo povus iel ripetiĝi.

Kur. — La Malnova testamento ne povas timigi nin.

Pastro. — Ni ricevis la lingvojn por uzi ilin, ne por anstataŭigi ilin per surrogato.

Kur. — Ni ricevis cerbon kaj ĉiujn aliajn bonajn aferojn por uzi kaj evoluigi ilin. Ni ricevis okulojn; sed ĉu estas malpermesite kompletigi ilin per mikroskopo kaj teleskopo?

Pastro. — Certe ne.

Kur. — Aŭ la orelojn per telefono kaj telegrafo?

Pastro. — Ne.

Kur. — Aŭ la krurojn per trajnoj, aŭtoj kaj flugmaŝinoj?

Pastro. — Ne.

Kur. — Rimarku, ke niaj naturaj kapabloj estas nur bazo por niaj artefaritaj. Nia forto fakte estas en la sciencaj instrumentoj. Kaj vi volas malpermesi al ni tuŝi la sanktan lingvon! Kompreneble la providenco volas, ke ni faru precize same kiel en la aliaj kampoj. Ĉie la ordono estas: Antaŭen!

Kol. — Se oni nur povus kredi tion.

Kur. — Tion montras al ni la naturo en kompreniga maniero: ĝi estas logika, amika, saĝa, senfina. Ĝi nur iom post iom senvualigas sin antaŭ niaj okuloj; sed ĝi mensogas neniam. Kion ni sentas en ni, tio estas la profunda, eterna vero, kaj tiu iam brilos kiel suno.

El notlibro

De K. R. C. STURMER

18.9.44.

Kino kontraŭ varieteo.

La modernaj industriaj kondiĉoj multe klarigas la evoluon de la filma tekniko kaj ĝian popularecon.

Ĉiu homo sentas deziron en sia artisma vivo partopreni, kunŝati kun aliaj homoj kaj poste diskuti pri la viditaj prezentoj.

Nuntempe niaj vivrilatoj kaj homrilatoj estas multe etenditaj. La avo loĝis sian tutan vivon en unu urbo kaj havis ĉiujn siajn amikojn kaj parencojn apude. La nepo loĝas en eksterurbo de granda civito, iras ĉiutage al la urbego, renkontas kolegojn el multaj aliaj eksterurboj. Kun ili li povas diskuti pri vidita filmo, ĉar ankaŭ ili vidis ĝin en sia propra kinejo. Li povas diskuti ĝin ankaŭ kiam li vizitas provincon kaj renkontas provincanojn.

Sed varieteo li povas diskuti nur kun loĝantoj de sia propra kvartalo.

18.9.44.

Kontraŭjuda senlo.

Oni jam aŭdis multajn klarigojn pri la antisemidismo. Ĝi troviĝas en mia londona eksterurbo ĉe personoj, kiuj preskaŭ nenion spertis pri la hebrea raso. Ĉe la fervoja stacidomo oni trovas sur aŭtojoj, sur benkoj kaj sur necesejaj muroj krazone skribitajn ofendajn sentencojn pri la judoj. Kompreneble temas pri kelkaj mense malsanaj tipoj, kiuj tiel esprimas sin kaŝe.

La plej vera klarigo estas laŭ mia opinio tiu pri mensa malsano. En mia metiejo estis iam lernanto-grupo, bona bubo, kiu en humoro de laco aŭ malgajo ĉiam emis kontraŭparolaĉi pri judoj. La samon oni trovas ĉe certaj viroj, kiuj sentas, ke ili ne sukce-

sis en la vivo tiom, kiom ili kredas meriti. Ŝajnas kvazaŭ la judoj ĉiam estus oportuna "batinda knabo" por propra malkontento pri la vivo, oportuna elirejo por propra psika malsanaĵo.

19.9.44.

Forigo de milito.

Oni nepre pensas ofte pri la diro de la romanverkisto George Gissing — nun legata nur de literaturistoj — samtempulo de Dickens, en membiografio maskita per la titolo "La privataj skribaĵoj de Henry Rycroft": "Vere, kiam oni rigardas la homojn en ilia propra medio, oni devas miri, ke la homaro ĝuas longajn intertempojn de paco". Ankaŭ, oni povas aldoni, kiam oni honeste rigardas sin mem.

Aldous Huxley, infanoj kaj feliĉo.

La verkisto Huxley estas nepo de la fama sciencisto samnoma — kolego de Darwin — kaj frato de Julian Huxley, ankaŭ sciencisto (biologo). Miaopinie Aldous ne estas grandioza kiel artisto. Neniu, kiu estas emocie mallaksa, povas esti granda artisto: esence la vivo estas afero emocia. Kiel filozofo kaj pensulo li tamen estas granda figuro. Mankas al li homeco, li estas tipa "intelektulo". Kelkfoje ŝajnas, ke li eĉ malamas la homan rason.

Li multe verkis, romanojn, novelojn, eseojn, sed por mi li estas aŭtoro de nur unu ĉefverko, la filozofia romano "Erava, nova mondo", kiu pritraktas la eternan problemon de homa destino, homa evoluo, t. e. ĉu feliĉo estas havebla aŭ eĉ havinda sur tiu ĉi tero.

Huxley ne estas kristano, sed en tiu ĉi majstra kaj satira verko li elmontras la malnovan kristanan tezon, ke tiu ĉi mondo ne estas, ne povas esti, ne devas esti mondo de daŭra feliĉo, elmontras la tezon en tute originala kaj brila formo.

Nun, en mezaĝo, mi trovas, ke la verko, legita jam antaŭ dek jaroj, konstante altrudas sin, kiam mi pripensas la vivon, aŭ kiam mi komentas ĝin aŭ aŭdas komentojn de aliaj. Antaŭ nelonge, ĉe amikoj, oni diris, ke iu knabeto kvinjara tute ne havas la kapablon distri sin, eĉ dum kelkaj minutoj. "Verŝajne", mi diris, "li ankoraŭ ne sufiĉe suferis dum sia ĝisnuna vivo." Iu ĉeestanto ŝajne trovis mian diron iom naŭza kaj protestis kontraŭ tio, ke oni povas rekomendi malfeliĉon por infana vivo. La diskuto iĝis ĝenerala, longe daŭris kaj kovris plurajn kampojn de religio, nereligio kaj malreligio, laŭ la diversaj temperamentoj.

Fakte mi ne rekomendis malfeliĉon por infanoj. Mi parolis laŭ la konstato, ke iom da ĝi minimume estas necesa por sana evoluo.

Mi memoras, ke Bertrand Russel kuraĝas rekomendi en sia libro pri infaneduko iun kvanton da enuo por infanoj. Ne estas bone, li kuraĝas diri, se ili havas konstante intereson kaj distron. Iu kvanto da enuo estas necesa por ilia sana evoluo. Bertrand Russel havas kuraĝon.

Doktrino de Kristo

De AGOSTINHO da SILVA

Reproduktado de tiu ĉi verketo estas permesata. Ĉiu reprodukto devas anonci tion.

(Portugala samideano deziras aperigon de tiu ĉi artikolo, kiun li tradukis el la portugala. La aŭtoro, dro da Silva, estas eminenta humanisto, kiu multege kaj diverse flankigis laboris por larĝa kultura progreso.)

1. Ekzistas Dio, kiu estas la tutaĵo de ĉio, kio estas rimark- ebbla en la universo. Ĉiu ekzistaĵo enhavas Dion, Dio enhavas ĉiun ekzistaĵon. Oni povas senblasfeme konsideri la imanentan aŭ la transcendan aspekton de Dio; oni povas senblasfeme paroli ne pri Dio, sed nur pri la Universo kun Spirito kaj Materio form- antaj nedisigeblaj tutaĵoj. La Dia doktrino, tia kia Kristo ĝin prezentis, permesas konsideri bonaj ĉiujn religiojn kvankam je malsamaj gradoj, religiemaj ĉiujn homojn. Do, oni ne povas fari en la nomo de Dio iun ajn persekuton: ĉiu homo havas liberon esplori kaj elekti; la pli aŭ malpli granda esplorkapablo kaj la rezulto de la elekto estas, en kiu ajn kazo, la esprimilo de tio, kio ĝi estas kaj de la maksimumo, kiun ĝi povos atingi laŭ siaj kapabloj.

2. La plej alta koncepto kiun ni povas havi pri Dio, ni, kiu estas nur ero de la Universo, estas koncepto pri Inteligento kaj Amo; la ĉefaj pekoj fareblaj de la homoj estas malvastigoj de la Inteligento aŭ de la Amo: ĉiu malvasta doktrino sen tolcremo kaj sen kompreno pri la diverseco de la mondo, ĉiu memvola nescio, ĉiu kontraŭstaro al la intelekta progreso de la homaro, ĉiu perforto, ĉiu malamo malvastigas nian spiriton, malebligas al ni kompreni la grandecon, la universalcon de Dio.

3. Dio postulas de ni nenian kulton; ni honoras Dion, ni plene kontaktas kun la Universo, kiam ni plivastigas nian Inteligenton kaj nian Amon: laboratorio, biblioteko estas temploj de Dio,

lernejo estas templo de Dio; metiejo estas templo de Dio; homo estas templo de Dio kaj la plej bela el ĉiuj. Ni ĉiuj povas esti sacerdotoj, ĉar ni ĉiuj havas kapablojn de Inteligento kaj Amo; kaj ni plej alte kultas Dion kiam ni disvastigas kulturon, kio signifas forigon de ĉiuj baroj katenantaj la Spiriton. Tiuj estas ankoraŭ malproksime de Dio, de vasta kompreno pri Dio, kiuj faras sian kulton el paroloj kaj ritoj; sed tiuj, kiuj pli alten iris, ne devas havi alian sintenon ol helpi al ili transiri la longan tra-irotan vojon. Neniu riproĉu sian fraton pro lia nuna stadio, sed pacience kaj persiste, kompreneme kaj ame klopodu lin levi al pli alta nivelo.

4. Por ke la homoj povu kompreni Dion, por ke ili povu, plibonigante sin, plibonigi ankaŭ la aliajn, ili bezonas esti liberaj; la ĉefaj liberecoj estas tri: kultura libereco, libereco por socia organizado, ekonomia libereco. Per kultura libereco la homoj povas maksimume disvolvi siajn kritikemajn kaj kreemajn naturdotojn; neniu fermas al ili iun ajn regionon, neniu malhelpas ilin sciigi al aliuloj tion, kion ili lernis aŭ ekpensis. En libereco por socia organizado la homoj partoprenas la aranĝon de sia socia vivado, administrante kaj gvidante per sistemoj ĉiam pli kaj pli perfektaj laŭ la plivastigo de sia kulturo; por bona reganto neniun regato estas gregokapo; li estas kvazaŭ lernanto de homec-lernejo: li devas esti edukata por la plej bona reĝimo inter eblaj reĝimoj. Per la ekonomia libereco la homoj garantias la bezonaĵon por ke la spirito liberiĝu de materiaj ĝenoj kaj povu sin dediĉi al la plej bela kaj la plej vasta ekzisto; neniun homo devas esti ekspluatata de alia homo; neniun devas per la posedo de produktiloj kaj trafikiloj ebligantaj ekspluatadon endanĝerigi Spirit-liberecon. En la Dia Regno, en la plej perfekta homa organizo, estos nenia kulturlimigo, nenia registara perforto, nenia posedrajto. Al ĉio ĉi oni povos alveni iom post iom kaj per ĉies frata klopodado.

MALGRANDA REVUO aperas kvaronjare. Prezo 1 kr., je mendo de minimume 10 ekz. po 0,80 kr. (inkl. sendkosten). Abono akceptata. Antaŭe aperintaj numeroj haveblaj.

Redaktoro-eldonanto: Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika.

Poŝtĉeka konto: 26 80 23.